Aŭstraliaj Esperantistoj

Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj — Nia Espero Nia Forto

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto 25/11/2012 Okdekkvina Eldono 2012 25/11/2012 SENDITA

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Provlegita de Nicole Else

La informa kaj noma paĝoj nur aperos en la dekaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ vidu **Tamen Plu** redaktas Katarina Taggart

Se vi ne ricevas Tamen Plu aŭ Australiaj Esperantistoj, aŭ ricevas dufoje, informu AE.

Kiam oni ne informas, onidiroj plenigas la mankon da informado

Skribu, informu 200 retadresaranojn de AE pri viaj novaĵoj

NOVAĴOJ





ALKLAKU la hiperligilojn



AŭSKULTU, LEGU **ESPERANTAN RETRADION** TAGE Informaj rakontetoj, Bona lingvo, Malmultaj minutoj. Plibonigu vian Esperanton

http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

3ZZZ

En Melburno vi povas aŭskulti lundon de la 1a ĝis la 2a ptm je 92.3 FM



De ie ajn en la mondo eblas aŭskulti dum la semajno kiam la programo estis elsendita je 3zzz.com.au aŭ iam ajn en la arkivigejo www.melburno.org.au. Aŭdeblas la voĉo de Alan Bishop, Karl Egger, Laszlo Farkas, Franciska Toubale kaj de multaj intervjuitoj

Kontaktu 3zzzesperanto@gmail.com

Fabeloj kun Voĉoj kaj Ilustritaj Fabeloj

http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/

Du Fratoj - Fabelo verkita de Hans Christian Andersen, esperantigita de Zamenhof.
Voĉoj: Flávio Fonseca kaj Cristina Pancieri.

KLUBNOVAĴO




Informas la aktivaj kluboj kaj grupoj



Central Coast Esperanto Club

kunvenos Sab 2ptm 8a dec 2012 Bamboo Buddha Café
221 Wattle Tree Road, Holgate NSW 2250



La Brisbana Esperanto-Societo

monate kunvenas sabaton je 13.00, en la Centra Urbega Biblioteko. Kunveno okazis je sabato novembro 17. Ni ekzercis nin pri gramatiko ktp. Je 15.00, ni iris al apuda kafejo por trinki kaj konversacii.

Kay Andersen



La Tasmania Esperanta Societo

kunvenas, ĉiun jaŭdon je la Metz trinkejo, Sandy Bay.
Je la 7-a ĝis 8:30 ĉe Metz kaj poste ni kutime kune vespermanĝas...

Roberto Budzul



ADELAJDA ESPEREJO, ĉe 81/9 East Tce ADELAIDE 5000

sabate 10.30 - 12.30 Brendan Linnane gvidas pri *La Bona Lingvo*
vendrede 10.00 - 12.00 Max Wearing gvidas pri *Gerda Malaperis*
Max Wearing <mwearing@internode.on.net> tel (08) 8359-3375



La Melburna Esperanto Klubo

"Kiel kutime, la Melburna Esperanto Klubo renkontiĝis ĉe Ross House je 6.30 ptm. Lundo: Naŭ membroj ĝuis la vesperon, Marcel, Alida, Jenny, Jim, Karlo, Heather, Kam, Carol kaj Ken kiu ĵus revenis el Lourdes en Francujo. Marcel klarigis kelkajn gramatikajn demandojn kaj post la tepaŭzo ni faris vortludojn." Heather



La Manlia Esperanto-Klubo kunvenos la 1an de Decembro. Ĉiuj bonvenaj. Unu taso da senpaga kafo Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf;



Esperanto-Domo Sidnejo 25 Nov 2012

Aferkunveno 11atm Amuzkunveno 12ptm ĝis 3ptm

Venis 11 homoj. Roger Springer, Nicole Else, Margaret Chaldecott, Dmitry Lushnikov, Volo Gueltling, Keith Bowling, Mark Pavic, Matthew Fitzsimon, Richard Delamore, Mei Springer, Joseph Leijak.

Sidnejo: Esperanto-Domo Zamenhof-Tago

la 16an de Decembro, 12a horo meztage. Ĉiuj bonvenaj.

Statistikoj el Lernu

Ĉe la retejo de lernu![2] troviĝas detalaj statistikoj pri la uzo de la retejo. Ekzemple, proksimume 7000 uzantoj kompletis la unuan parton de la baza kurso Ana Pana, kaj 1500 (do ĉirkaŭ 20%) kompletis la lastan (8-an) parton. Ĝis julio 2008, entute proksimume 3,6 milionoj da vizitantoj foliumis la retejon.

La 29-an de majo 2011 *lernu!* atingis la nombron de 100.000 registritaj uzantoj.[3]



Ĉu via klubo/grupo kunvenis? as? os?

Maldetala informo sufiĉas. Kiuj ĉeestis? . rspring@tpg.com.au

Taŭga desegno, ikono aŭ foto, ne necesa, sed bonvena

Ĉu $241,600 aŭ pli? uzis AEA dum 7 jaroj 2005-2012 Ĉu estas bona kont-libro?

AEA Informas

AEA raportas

Nia lasta Skype kunveno okazis jaŭdon, la 22-an de novembro 2012.
Partoprenis Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret kaj Sandor.

* La ĉefa temo de la kunveno estis la programo de nia Melburna evento (17/1 – 21/1/2013) en januaro. Ĝis nun ni havas programerojn de Daniel Kane, Katya kaj AEA kunvenon.

Bonvolu serioze konsideri **vian** kontribuon.
Ĝis nun 27 homoj aliĝis.

* Nia financa situacio estas iomete pli klara, sed restas sufiĉe multe da neklaraj truoj.
Indrani diligente daŭrigas la esploradon.
Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret, Sandor

* La planoj ordigi niajn aĵojn dum la Melburno evento progresas. Huigh Malcolm, Barry Cledsmith, Katya Steele kaj (esperebble) Terry Manly gvidos la ordigon de nia historio.
Ni ankaŭ komencis esplori la eblecon digitaligi multajn de niaj malnovaj fotoj, librokovriloj,….Se vi povas/volas helpi, ni tre bezonas vin.

* Se vi ŝatas prezenti ion al la estraro, vi povus aliĝi al unu de niaj Skype kunvenoj. La venonta okazos la 6-an de decembro.



Ne estos Aŭstralia somerlernejo dum januaro 2013, estos Bonkora Kongreso 17-21 Januaro 2012 en Melburno. Pliaj informoj venos


LETEROJ mallongaj de la legantoj




Malpli ol duona paĝo Taŭga desegno aŭ foto, ne necesa, sed bonvena

Mi, Bob Felby, ne plu redaktas Tamen Plu, ĝin redaktas Katarina Taggart !
Plej amike, Bob

Skribu al ni



LETEROJ IOM LONGAJ



Pli ol duona paĝo Taŭga desegno aŭ foto, ne necesa, sed bonvena



Skribu al ni